NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz Novembro 1993
**********************************************************************

**MEL SUGESTAS KRISTNASKAN DONACON**

**AĈETU "Esperanto: fenómeno de la comunicación", la plej aktuala libro hispan-lingve pri la internacia lingvo. Prezo 1.300 ptjn (inkludas IVA-on kaj sendokoston al Hispanio). 20% rabato pro pli ol 5 ekzemplerojn. ANTAŬPAGO NECESE, pere de POŜTĜIRO, al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4°. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON.**

**MADRIDANOJ EN SANT CUGAT**

Miguel Fernández prelegis pri la verko de F. García Lorca la 10-an de Oktobro en la Turisma Semajno organizita de Hispana Esperanta Fervojista Asocio, en Sant Cugat del Vallés. Kelkaj madridanoj partoprenis en la esperanta renkontiĝo

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4° Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3°-7). Aliaj tagoj uzu automatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79

**ZAMENHOFA B A N K E D O**
Hotel Puerta Toledo
11 Decembro. 14.00 h.
2.600 ptj.
(Antaŭpago necese ĉe Liceo)

**En Segovio okazas esperanta rondo merkrede je la 18.00 ĉe Casa del Deporte - gvidas Cesar de Mosteyrín.**

Bazaj kursoj: HEF-CO marde kaj ĵaŭde. 18.30 ĝis 20
(en Madrido) Centro Cultural. c/ Maestro Alonso (Ventas) merkrede 18.30-20.00 horo.
Asociación Espírita.Puerta del Sol

Venontaj programoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4°:
**15-a de novembro Prelego "Vizito al Ĉinio". Félix Gómez.**
**20-a de decembro: Prelego de L.Ojer "SAT en la Eŭropa Komunumo"**

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::
ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4° 28012 Madrid

**N I A V O Ĉ O**
**Organo de Madrida Esperanto-Liceo**
**Atocha 98-4°. 28012 Madrid**
**Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz** **Novembro 1993**

**DANKON!!**
Ekde la paĝoj de "Nia voĉo" la estraro de la Liceo dankas la helpon de madridanoj kiuj laboris antaŭ, dum UK (ni ne metas nomojn ĉar timas forgesi iun) kaj gvidis du postkongresajn ekskursojn.

**GRAVAJ KONGRESANOJ**
Ni mencias nur du: Luis de Otaola kiu estis la plej veterana kongresano (93 jaroj) kaj Miguel Fernández laŭ Heroldo de Esperanto "Kongresano de la jaro" kiu unua fojo partoprenis en UK. Kia partopreno! Kunaŭtoro de la kantato, preleganto en kongresa universitato, gajninto de 5 premioj, respondeculo kaj prezentisto de la arta programo.

**ĈU BICIKLAS?**
Manolo Parra iris al Valencio bicikle ekde Segovio, sed.... unue renkontiĝis en Pirineos kun alia esperantisto kaj kune atingis UK-urbon.

**ESPERANTA KUNVENO EN EKS-JUGOSLAVIO**
Georgo Kamaĉo partoprenis en TEJO/KER Seminario okazinta en Pula (Kroatio). Por atingi la urbon li suferis diversajn malfacilaĵojn
sed finfine li povis prelegi pri "Sekvoj kaj gentismo (etnismo)".

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**
11-14 novembro. 8-a Internacia Kultura E-Festivalo. Parizo.
4-7 decembro. 26-a Kataluna Kongreso de Esperanto. Alcudia (Mallorca). Kataluna E-Asocio (93) 716 36 33
Hispana Kongreso 1994. Malago
79-a UK 1994.Seulo.
80-a UK 1995 Tampereo (Finnlando)
82-a UK 1997 Australio

L O T E R I O

Esperanto-Liceo de Madrid

4 5.6 7 9

Ni sendas poŝtĝire

**KOLEKTADO DE ARTIKOLOJ**
MEL petas al ĉiuj esperantaj grupoj kaj esperantistoj sendi kopion deĵurnal-artikoloj pri esperanto aperintaj dum 1993. Temas pri farado de dosiero por kontroli utilecon de la gazetara servo okazinta dum UK de Valencia